

KOMENCIĜAS NOVA KURSO EN SIDEJO

La 6an de oktobro komenciĝos nova ĉeesta kurso en la sidejo de MEL. Ĝi okazos ĉiujn sabatojn dum venontaj tri monatoj, inter la 11,00 kaj 13,00, en strato Rodríguez San Pedro, 13 kaj ĝin gvidos Pedro Hernández. Ankoraŭ eblas aliĝi, kaj por tio interesatoj bv. skribi al la adreso de MEL madrid@esperanto.es, aŭ rekte al la instruisto pedro@esperanto.es.

PREZENTADO EN LA AŬTONOMA UNIVERSITATO

Dum tiu ĉi monato okazos prelego kaj laborrondo pri Esperanto en la Universitato Aŭtonoma en la Fakultato de Homaj Sciencoj (*Facultad de Filosofía y Letras*), en Cantoblanco, kun apogo de la universitataj aŭtoritatoj kaj de Hispana Esperanto-Federacio.

La 16an de oktobro 2018 (mardo), la prezidanto de HEJS kaj studento de tiu Universitato, William Guerrero prezentos esperanton al la interesata publiko per prelegeto. Poste, dum tri tagoj, la 18a, 23a kaj 25a de oktobro (respektive: ĵaŭdo, mardo kaj ĵaŭdo), la profesoro Ricardo Albert gvidos laborrondon ("taller"), kiu enkondukos la ĉeestantojn en la lingvon el teoria kaj praktika vidpunktoj. Ĉeestantoj ricevos atestilon de HEF kaj la Universitato. La aktivadoj okazos je la 2-a vespere por ebligi ĉeeston de matenaj kaj vesperaj lernantoj.

Samtempe, inter la 15a kaj 26a oni montros ekspozicion pri la lingvo en la halo de la Fakultato.

NOVAJ ASOCIO KAJ KURSO EN FUENLABRADO

La mardon, 16an je la 18:30, en la Oficiala Lingvolernejo (E.O.I.) de la urbo Fuenlabrado okazos formala prezento de asocio de Esperanto, fondita surbaze de la lernantoj de la kurso dum la pasinta jaro. Oni samtempe profitos la okazon por prezenti kaj propagandi la novan kurson disvolviĝontan en tiu Lernejo depost tiu ĉi monato.

Tiu ĉi okazos de la 23a de oktobro ĝis la 29a de januaro 2019, ĉiujn mardojn inter la 17:00-18:30 horoj. La nivelo estos la baza, kaj la loko estos la EOI (strato Islandia, 1). Por informoj kaj enskribiĝo telefonu al 680527568.



NOVA SABATA RENDEVUO

La 6an de oktobro, ni denove kunvokas unuasabatan renkonton. Ĉar ŝajnas ke la vetero tion ebligas, ni rendezuos denove en la Parko Retiro, je la 6a vespere, ĉe la statuo de Ricardo Codorniu, en la promenejo Julio Romero de Torres, tre proksime al la Vitra Palaco (*Palacio de Cristal*). Se vi ne konas la lokon, notu tiun ĉi adreson en Guglo-Mapoj: <https://goo.gl/maps/7VZN5AeLZbT2>, aŭ telefonu al la numero de la Federacio 638 547 104.

Ni invitas speciale novulojn kaj lernantojn, por komenci praktiki la lingvon kaj koni aliajn samlingvanojn.

KURSO EN UNED

Ni rememorigas ke plu estas malfermita la enskribiĝo por la kurso de Esperanto en la lingvolerna centro CUID de la Nacia Universitato pri Neĉeesta Edukado UNED. Ne forgesu informi al viaj konatoj interesitaj. Ĉiujn detalojn ĉe: <http://www.cuid.uned.es/>.

FOIRO DE SOLIDARA EKONOMIO

Kiel anoncite, la semajnfino de la 22a kaj 23a de septembro, MEL partoprenis en la Foiro de Solidara Ekonomio, per budo kaj gvidado de debato pri problemoj en internacia komunikado.



Ĝi estis tre bona okazo por prezenti nian lingvon kaj niajn aktivaĵojn. Ni povas menciĝi kelkajn kuriozajn reagojn de preterpasantoj. El tiu publiko, relative multaj jam scias kio estas Esperanto, kaj eĉ havis rilaton kun ĝi, sed ĝenerale surpriziĝas, ke ankoraŭ iuj okupiĝas pri ĝi. Iu diris: “¿O sea, que otra vez lo habéis relanzado?”. Alia rekte demandis: “¿El esperanto se va a imponer o no se va a imponer?”.

Konklude, ni faris bonan propagandon en taŭga medio, kaj indus ripeti en sekvaj jaroj.

EŬROPA SEMAJNO DE LA LINGVOJ

Ankaŭ tre sukcesis la anoncita agado okaze de la Eŭropa Semajno de la Lingvoj, al kiu HEF estis invitita de la asocio de oficialaj lingvoinstitutoj EUNIC, nome, la fulma prezentado de lingvoj laŭ la modelo “speakdating”, en kiu 12 lingvoj prezentiĝis al individuaj interesitoj dum po 5 minutoj, Pri Esperanto okupiĝis Félix Jiménez, kiu sukcesis interesigi multajn partoprenantojn de ĉiuj aĝoj.

**VIZITIS NIN**

La 15an de septembro nia amikino Fatma Eroĝlan, el Turkio, kunvenis kun esperantistoj dum sia vojaĝo al Madrido kaj vizitis akompanate la urban centron.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com